



Paroĥa Preĝejo de
SANKTAJ JOHANO
KAJ PAŬLO
en Rimini

ETA GVIDLIBRO
en esperanto

ANTAŬPAROLO

En la epoko de la tutmondiĝo kaj de la Eŭropa Unio, fariĝas ĝustatempa kaj aparta kultura valoro, ĉu loka ĉu tergloba, la mozaika tutajo de nia paroĥo, kun siaj dulingvaj skribaĵoj, itale kaj internacilingve.

Ĉar temas pri ĉe marborda paroĥo oni deziris eksperimenti en la medio la influon de la internacia lingvo Esperanto.

Oni komencis en 1975 per inaŭguro de la nova kinejo kun 450 sidlokoj per la dulingva novtitolo “Kinejo ESPERO”. (Hodiaŭ ĝi estas paroĥa SALONO ESPERO). Por la inaŭguro oni invitis polajn samideanojn, kiuj alvenis gvidataj de Lia Ekscelenco Mons-ro Władysław Miziołek (1914-2000) kun la ĥor-ensemblo “MUZILO”.

La reagoj ĉe la loĝantaro de la kvartalo estis tute pozitivaj.

Tio instigis nin daŭrigi agadon pere de Esperanto, uzante ĝin por diversaj paroĥaj iniciatoj, precipe karitataj (entute oni disponigis pli ol 197.000 usonajn dolarojn dum 23 jaroj).

*Kompreneble **karitato** estas nia ĉefa, pli ambicia kaj valora “monumento” realigata per Esperanto, ol la artaĵoj (same valoraj), kiujn ni prezentas en ĉi tiu broŝuro.*

Kiam la Eklezio enkondukis Esperanton en la Liturgion kaj uzis ĝin por diversaj aliaj ekleziaj rilatoj, maturiĝis la tempo por ke la lingva dunomo, itala-esperanto, eniru pli konkrete en la paroĥan vivon. Oni tial decidis enkonduki Esperanton, unuafoje kaj ĝuste en tiu ĉi Rimini-Diocezo (nomata “eŭropa strando”), en la historion de la kristana arto por substreki la unuiĝon kaj la harmonion de la Kredo kun la neŭtrala



Lingvo Internacia.

Laŭ ni temas pri du necesaj kaj fundamentaj elementoj por la Tutmondiĝo kaj por la Eŭropa Unuiĝo.

Krome, la mozaikaro estas ankaŭ historia atesto pri kelkaj gravaj atingoj de IKUE (Internacia Katolika Unuiĝo Esperantista) ligitaj kun tiu ĉi paroĥo. Ili estas:

*1 - **La oficiala agnosko de IKUE** fare de la Papa Konsilio de la Laikoj (1992). La agnosko ŝuldiĝas al iniciato de la paroĥestro, kiu tiam estis IKUE-prezidanto. Pro tio la katolikaj esperantistoj financis la plejparton de la mozaikoj, kiel memorigas la mozaika skribita ŝildo: «La Katolikaj Esperantistoj 1998».*

*2 - **La unua paska bondeziro** “Urbi et orbi” (al Romo kaj al mondo) farita de Papo en Esperanto: “3.04.1994 Feliĉan Paskon en Kristo resurektinta”. Ankaŭ*

ĉi tiu evento, kiu ripetiĝas ĉiujare, estis frukto de insistaj petoj al Johano Paŭlo la 2a fare de la paroĥestro.

3 - **La preparado kaj la presado en Rimini (1995)** de la unua romkatolika Meslibro en Esperanto por dimanĉoj kaj festotagoj, aprobita de la Kongregacio de Dia Kulto kaj de la Sakramentoj (1990).

4 - **Koresponda interrilato kun la polaj gesamideanoj dum la malfacilaj jaroj 1982-86.** Oni havigis al ili pli ol 5.000 pakaĵoj kun nutrovaroj, vestaĵoj kaj medikamentoj, parte pere de poŝta alsendo, parte pere de kvin ŝarĝkamionoj.



1984: forveturas el nia paroĥo ŝarĝkamiono por porti helpovarojn al Gdansko (Pollando), kie interalie ni renkontiĝis kun Lech Wałęsa

Samtempe, ankoraŭ per Esperanto, oni aranĝis du aŭtobusajn karavanojn por ĝemeliĝo de du riminaj paroĥoj, Sanktaj Johano kaj Paŭlo kaj Sankta Marteno "in Venti", kun du orientlandaj paroĥoj - Sankta Aleksandro en Kiev/Ukrainio (1993) kaj Sankta Ladislao en Oradea/Rumanio (1994) - kaj por donaci al ili bronzan statuon de Patro Pio.

5 - **La 50a kaj la 53a IKUE-kongresoj** okazintaj en la paroĥo, respektive en la jaroj 1997 kaj 2000. Dum ĉi-lasta kongreso oni alinomis, pro la E-mozaikoj, la paroĥan preĝejon "Internacia Katedralo". (verdire, por komenci, sufiĉus nur: "Eŭropa Katedralo"!). Efektive, oni planas ke la preĝejo fariĝu iom post iom ankaŭ **ekumena preĝejo**.

Oni intencas ankaŭ realigi mozaikajn portretojn de la plej elstaraj martiroj de ĉiuj kristanaj konfesioj, la Atestantoj de la Kredo, inkluzivante ankaŭ la esperantistojn - aŭ la simpatiantojn de Esperanto - kiuj suferis pro la kredo.

Ni citas la plej konatajn: Maksimiliano Maria Kolbe (Pollando), Titus Brandsma (Nederlando), Juan Font -Giralt (Hispanio), Max Jozef Metzger (Austrio), Alojzie Štepinac (Jugoslavio-Kroatio), Evgeni Bossilkov (Bulgario), T. Romza (Ukrainio), P. Florenkij (Rusio)... Tiuj ĉi kaj multaj aliaj, kiuj fariĝis eŭropaj "martiroj" fare de la du ĉefaj ideologioj de la 20a jarcento starintaj kontraŭ la diversaj konfesioj, konsistigas multajn pecojn de la sama mozaiko, la Eklezio.

Ilia komuna memorigo kaj honoro en la sama "Eŭropa Katedralo" estas grava kontribuo al la unuiĝo de la kristanoj.

Kompreneble, tio postulas tempon kaj monhelpon, sed oni scias ke guto plus guto estigas la maron. Pro tio oni kuraĝas alvoki al libervolaj E-mecenatoj de la tuta mondo.

Ke ĉi tiu preĝejo povu tiel fariĝi mondfama kaj originala "monumento" ĉu pri ekumeno ĉu pri la internacia lingvo.

HISTORIAJ NOTOJ

Per dekreto de Monsinjoro Luigi Santa, Episkopo de Rimini, la 20an de novembro 1950 la paroĥo de Sanktaj Johano kaj Paŭlo, konservante sian titolon, estis delokita el la urbocentro de Rimini (Strato Soardi) al San Giuliano Mare (*elp.: San Ĝuljano Mare*), urboparto kun legom-ĝardenoj kaj loĝata de fiŝkaptistoj, kiu, post la dua mondmilito, pli kaj pli fariĝis popola kaj turisma kvartalo. Ĝi staras meze de la ŝiphaveno, la fervojo, la maro kaj la river-devojiĝo Marecchia (*elp.: Marekkja*)

La 13an de januaro 1952 oni benis la unuan ŝtonon de la nova paroĥa preĝejo, projektita kaj konstruita de I.F.R.I. (financa instituto por nemoveblaj rekonstruado) de Romo. La preĝejon oni inaŭguris la 12an de oktobro 1952. Bedaŭrinde, la 23an de oktobro 1953, pro apuda eksplodo de cisterna kamiono, 150 personoj estis vunditaj kaj grave bruligitaj. Kvin el ĉi-lastaj poste mortis. La preĝejo estis grave damaĝita.

Posteuloj de la unua paroĥestro, Pastro Giuseppe Garavelli, estis Pastro Vittorio Frisoni (1956-1960), Pastro Agostino Amadori (1960-1964) kaj, ekde 1964, la nuna paroĥestro Pastro Duilio Magnani.

En 1958 estis starigita, en la zono de la ŝiphaveno, alia paroĥo, San Giuseppe al Porto (Sankta Jozefo ĉe la ŝiphaveno). Tio duonigis la nombron da fideluloj de la paroĥo Sanktaj Johano kaj Paŭlo, kiu nuntempe konsistas el 1.500 enloĝantoj.



Sen iu ajn ludloko subĉiele por la junularo, la paroĥo posedas la pastran domon, la katekismajn salonetojn kaj, kiel supre dirite, la Saloon ESPERO (eksa kinjo). Tamen ĉeestas surloke infanĝardeno kun parkejo, mastrumata de la Fratinoj de la Sankta Familio.

La paroĥan preĝejon interne transformis en 1966, laŭ la novaj liturgiaj normoj de la dua vatikana Koncilio, Arkitekto Giorgio Franchini.

La preĝejon riĉiĝis ankaŭ per artaj Krucifikso kaj Krucvojo de la rimina ceramikisto Guido Baldini (†1999). En la jaroj 1996-2000 la preĝeja interno estis ornamita per valoraj mozaikoj desegnitaj kaj realigitaj de Antonino Vaccalluzzo el Raveno.

La temoj estis proponitaj de la paroĥestro Duilio Magnani.

LA PAROĤA EMBLEMO

La Paroĥo havas sian emblemon kiu konsistas el du literoj "E" verdkoloraj, sur blanka fono, unu fronte al la alia, dividitaj de granda Kruco orkolora. La du "E" signifas la du Eŭropojn, la orientan kaj la okcidentan, radikitajn en Kristo. Temas pri du pulmoj en unu estaĵo, la fariĝonta Eŭropa Unio. Efektive, en la internaj spacoj de la du "E" situas la komencaj literoj, itale kaj Esperante, de Eŭropa Unio kaj Unione Europea. Sed la du "E", pro siaj formoj, povas indiki ankaŭ la du terglobajn emisferojn, nordon kaj sudon. La Kruco instigas enkulturigi en la terglobajn popolojn la Kredon en Kristo. La tria signifo de la du "E" estas tiu de la Internacia Lingvo Esperanto, kiu povus solvi bonege la problemon de la komunikado ĉu eŭroponivele ĉu tutmonde, kun plena respekto de ĉies popolaj lingvoj kaj kulturoj.

Tiu ĉi emblemo estas gravurita sur la enireja vitralo kaj plie ĝi estas mozaikita je la centro de la triumfa arkaĵo de la



presbiteriejo. Ĝi aperas ankaŭ en la kvar rozvitraĵoj, lumigitaj nokte de la sonorilturo, kaj en la malantaŭa fasado de la preĝejo. Temas pri realigoj de la rimina vitro-metiisto Riccardo Germondari, starigitaj dum la Jubileo 2000.

LA TITOLO DE LA PAROĤO

Starante sur la preĝeja placeto, oni rimarkas sur la vitro-pordegoj (metiaĵo 1997 de vitrofarejo Evangelisti, Rimini) kiuj fermas la portikon, la nomon de la paroĥo, itallingve maldekstre kaj Elingve dekstre. Sub la portiko, la centran pordegon fermas alta kaj dika ferkrado, kiu, kiam la preĝejo estas fermita, baras la eniron, tamen ebligante adori la Eŭkaristion kaj admiri la mozaikojn.



Pastoro Magnani transdonas al mozaikisto Antonino Vaccalluzzo (centre) honor-pergamenon ennomme de IKUE.

En la apuda paĝo: alte, la fasado de la Paroĥo. Malalte, la Krucifikso farita de Guido Baldini

LA RIMINAJ ATESTANTOJ

Tri rondaj ceramikaĵoj, verkoj de Giovanni Mazzocoli, kun bildoj kaj dulingvaj klarigoj, estas muntitaj en la



supera parto de la fera krado

En la centra ceramikaĵo aperas du el la sep riminaj beatuloj: Fratino Elisabetta Renzi (1786-1859, beatproklamita en 1989) kaj Frato Pio Campidelli (1868-1889, beat-proklamita en 1985), pasionisto.

Je maldekstra kaj dekstra flankoj estas la bildoj de du nuntempaj Diservantoj kultin-daj ri-

minanoj, respektive Carla Ronci (1936-1970), ankaŭ konata de p. Magnani kiel Dioceza Asistanto de la virina sekcio de la Katolika Agado, kaj Inĝ-ro Alberto Marvelli (1918-1946), skabeno pri la publikaj laboroj de la Komunumo de Rimini.

Kiu eniras la preĝejon, do, memoras pli facile ke *atestantoj* de sankteco povas esti ĉu pasintepokaj ĉu nuntempaj civitanoj.

LA PASKA MISTERO

La unua mozaiko, inaŭgurita en la absida lunedo en 1996, prezentas la Paskan Misteron. Je ĝia centro staras vitralo kiu bildigas Kriston resurektintan kun ĉir-kaŭa skribaĵo: Felican Paskon en Kristo resu-

rektinta, 03.04.1994, memore de la unua papa paska bondeziro en la internacia lingvo Esperanto.

La vitralo estas verko de firmao *Carpediem* de Cesena, kiu pentris vizaĝon de Kristo





similan al tiu de la Viro de la Mortotuko, sed ridetanta. Per sia maldekstra mano Kristo tenas la bastonon kun la flago (nevidebla) de la venko de la Vivo sur la morto, dum per la dekstra mano Li montras ke Li mem estas, kiel skribite sur la malfermita libro, la “Vojo, Vero, Vivo” (kp. Joh 14, 6).

Ĉirkaŭas la vitralon, sub la lumradioj de la Sankta Spirito en formo de kolombo, malnovaj kaj novaj eventoj de la historio. Kelkaj el ili estas pozitivaj. La Eklezio indikata per diversaj sim-



boloj: la Baziliko de Sankta Petro, la Baziliko de Fatimo kun la sundanco, la fer-turo de la radiaj dissendoj, la

blazono de Papo Johano Paŭlo la 2a kaj la du volumoj de la E-Meslibro).

La aliaj eventoj bildigitaj (tiuj malpozitivaj) aludas la ribelon kontraŭ la projekto de Dio, per diversaj simboloj: la Babel-turo, la insignoj de la du plej gravaj ideologioj de la 20a jarcento - komunismo kaj naziismo - la fungo de la atombombo, la Murego de Berlino kun la ruĝa stelo, la pikildratoj de la Gulagoj kaj de la Koncentrejoj, la bomb-eksplodoj.

Bone kamuflita inter la malhelaj koloroj

la tentanta “antikva serpento” ekaperas el la fratrasoj kaj indikas sian taskon per la ruĝa lango.





La skribo, kiu aperas sur la triumfa arkaĵo de la presbiteriejo, enkadrigas la absidan mozaikparton kaj subtenas la duan mozaikparton, super la arkaĵo mem, sur kies ora fono, inter ŝvebantaj nubetoj, staras kelkaj Atestantoj de la Kredo: la Sanktaj Patronoj de la preĝejo (Johano kaj Paŭlo), la Patronoj de Eŭropo (Benedikto, Cirilo kaj Metodo) kaj la nova Beatulo, Patro Pio.

LA PATRONOJ DE LA PAROĤO

Martiroj (etimologie tio signifas *Atestantoj*) **Johano kaj Paŭlo** estis mortigitaj dum la regado de imperiestro Juliano la Apostatinto en la dua duono de la kvara jarcento (361-363). Ili estis soldatoj - servistoj de la filino de imperiestro Konstanteno, Kostanca. Kiam ŝia patro mortis Kostanca heredigis la du fratojn per riĉaĵoj kaj domo sur la monteto Ĉeljo, proksime de la imperiestra Palaco kaj de Koloseo.

Freŝdata arkeologia eltrovo financita de Kardinalo Spellmann, ĉefepiskopo de Novjorko, titulara de la Baziliko de Sanktaj Johano kaj Paŭlo ĉe Ĉeljo en Romo, pruvis ke la domo de la du martiroj situas ĝuste je du etaĝoj sub la nivelo de la nuna Baziliko.

La domo, post la martirigo, transformiĝis en kultejon. Ekde la unuaj pratempoj iliaj nomoj estis enlistigitaj en la “Roman kanonon” kune kun aliaj famaj martiroj, kaj ilia festo estas celebrata ĉiujare la 26an de junio.

Kiel okazis la martirigoj? Kiam Juliano fariĝis imperiestro, li rezignis la kristanan Kredon kaj alinomiĝis Apostatinto. Laŭ la historiistoj, kiam la imperiestro restis sag-vundita dum la milito kun la Dacoj, li ĵetis al la Ĉielo la sangantan sagon ekkriante:



LA PATRONOJ DE EŬROPO

En tri medalionoj, super la triumfa arkaĵo, flanke de Sankta Benedikto centre, estas mozaikaj bildigitaj la du slavaj fratoj, Sanktaj Cirilo (maldekstre) kaj Metodo (dekstre) kunpatronoj de Eŭropo. La unuan de oktobro 1999 Papo Johano Paŭlo la 2a, okaze de la inaŭguro de la dua speciala asembleo de la Sinodo de la episkopoj dediĉita al Eŭropo, elektis kaj proklamis ankaŭ tri famajn Sanktulinojn kiel Patroninojn de Eŭropo, t.e. la itala Katarina el Sieno, Birgitta el Svedio kaj Edith Stein. Eble ankaŭ por ili ni trovos lokon por mozaiko en nia “internacia kaj eŭropa katedralo”, se Dio donos tempon, kaj la katolikaj gesamideanoj monhelpon.



Sankta Benedikto naskiĝis en Norcia (elp. *Norĉja*) en 480 kaj mortis en Montecassino (elp. *Montekasino*) en 547, verŝajne la 21an de marto. Li estas la Patriarko de la okcidenta monaĥismo.

Post soleca periodo ĉe la Sankta Groto de Subiaco (elp. *Subjako*), li transiris al cenobita reformo antaŭe en Subiaco, poste en Montecassino. Lia Regulo, kiu reprenas la monaĥan tradicion de Oriento adaptante ĝin al la latina mondo per saĝeco kaj respektemo, malfermas novan vivon en la eŭropa civilizacio post la falego de la romia mondo. En tiu trejnejo je la servo de la Sinjoro unuarangas la medita legado de la Dia Parolo kaj la liturgia Laŭdo, alterne kun la labor-ritmoj en intensa etoso de frata amo kaj reciproka servo. Laŭ la sulko de Sankta Benedikto ekaperis en la eŭropa kontinento kaj en la insuloj preĝ-, kultur-, gastigcentroj kaj homa evoluigo por malriĉuloj kaj pilgrimantoj. Paŭlo la 6a proklamis lin Patrono de Eŭropo la 24an de oktobro 1964.

“Galileano, vi venkis!”.

Tamen, ne nur li neis Kriston, sed li devigis la subulojn fari la samon. La fratoj Johano kaj Paŭlo rifuzis bruligi incenson honore al Jovo-statuoj kaj Terencjano, urbestro de Romo, donis al ili dek tagojn por decidi. Ili uzis la tempon por disvendi ĉion kaj disdoni la monon al la malriĉuloj. Ĉar la du fratoj definitive rifuzis adori Jovo-statuojn, ili estis senkapigitaj en sia domo. Kial ne publike? Oni timis ribelon de la popolo, ĉar la fratoj estis tre amataj, kaj pro tio oni kredigis ke ili estis ekzilitaj.

En nia paroĥo ekzistis iam olea pentraĵo pri la martirigo, kopio de la originalo konservata en Romo, sed ĝi detruigis pro la brulego de 1953, kiun ni menciis je paĝo 4.

En la nuna mozaiko la du atestantoj ne estas bildigitaj dum la senkapigo, kiel okazas en la tradicia ikonografio, sed ili aperas glorataj, t.e. starantaj kun la palmobranĉo enmane en ora fono kaj inter nebuletoj. La liturgia festo tago de la martiroj Johano kaj Paŭlo okazas la 26an de junio, sed en nia paroĥo oni festas ilin la unuan dimanĉon

Cirilo kaj Metodo naskiĝis en Tesaloniko (Greklando), la dua urbo de la bizanca imperio kie la patro, Leono, estradis la bizancan Distrikton. La plej juna el la naŭ gefiloj naskiĝis en 827 kaj nomiĝis Konstanteno. Poste li alprenis la nomon Cirilo. Unu el la pliaĝaj nomiĝis Metodo.

Cirilo, tre inteligenta kaj el tute esceptaj memorkapabloj, studis filozofion ĉe la imperiestra lernejo de Konstantinopolo. La urbo eknomiĝis tiel kiam imperiestro Konstanteno translokigis de Romo al Bizanco la imperian kortumon. Kiam la romia imperio dividiĝis (395) Konstantinopolo fariĝis ĉefurbo de la Orienta imperio, nomita ankaŭ “bizanca imperio”.

En Konstantinopolo Cirilo diakoniĝis kaj estis sekretario de Patriarko Ignacio. Poste li monaĥiĝis kaj profesoris en la imperiestra lernejo kie li studis. Tiel li fariĝis kolego de Focjo, kiu disiĝis de Romo.

Cirilo estis tiel fama ke oni sendis lin por diplomacia misio ĉe la Araboj. Poste kun sia frato Metodo, kiu intertempe, post alte taksata administrado de la imperiestra Distrikto en Macedonio, ankaŭ monaĥiĝis, ricevis diplomatan

mision ĉe la Kazananoj, popolo turk-tatara de la nuna Rusio.

Okaze de tiu ĉi misio, dum Cirilo kaj Metodo loĝis en Kerson/Krimeo (jaroj 860-861) ili malkovris la tombon de Papo Klemento, la tria posteulo de Petro en Romo, kiun imperiestro Traiano ekziligis en la nuna Rumanio. Kondamnita je trudlaboro en marmorminejo en insulo Kerson en la Nigra Maro, Papo Klemento estis jetita en la maron kun ankro ligita je lia kolo. La kristana popolo de Kerson elakvigis la korpon kaj entombigis ĝin ankoraŭ kun la ankro je la kolo, honorante lin kiel sian Patronon.

Papo Klemento famiĝis pro sia letero al la Korintanoj skribita ĝuste kiel posteulo de Petro. Temas pri tre grava dokumento, kiu pruvas la aŭtoritaton de la Papo en la tuta Eklezio.

Cirilo kaj Metodo ne sukcesas havi monaĥan kvieton, ĉar imperiestro Miĥaelo la 3a en 862 sendas ilin misie al Granda Moravio, la nunaj Slovakio kaj Hungario, inter la slavaj popoloj.

Por tiuj ĉi popoloj, kiuj ne konas la grekan kaj des malpli la latinan kaj la hebrean lingvojn, ili inventas novan alfabeton, la *glagolicon*, el kiu poste naskiĝos la tiel nomata cirila alfabeto.



Ili transskribas en ĝin la Bibliion kaj ĉiujn liturgiajn librojn necesajn por la novkonvertiĝintoj al kristanismo. Pro la uzo de la popola lingvo, treege granda kaj grava novaĵo, estiĝis granda problemo kun Romo, ĉar tiu ĉi pretendis altrudi la latinan, la grekan kaj la hebrean lingvojn ankaŭ al novaj konvertiĝintaj popoloj. “Nenio nova sub la suno” kiam la fakto ripetiĝos kun la internacia lingvo Esperanto!

Papo Adriano la 2a tamen, ĉar la fratoj venis al Romo por klarigi la problemon kaj samtempe liveri al la Papo la relikvojn de Sankta Klemento, en 868 aprobas, verŝajne en la Baziliko de Sankta Maria la Granda, la novan slavlingvan Liturgion.

Kun plena kontento la du fratoj rajtis celebri slavlingve ĉe la Tombo de Sankta Petro kaj poste en la aliaj plej gravaj romaj preĝejoj, kiel ekzemple en Sankta Paŭlo ekster la Muregoj, kie ankoraŭ oni konservas kelkajn murojn de la tiama preĝejo en kiu la du fratoj kantis la Brevieron kaj celebris Meson en la slava lingvo.

Ŝajnas al ni oportune rimarkigi ĉi tie la saman batalon okazintan - 1200 jarojn poste - por enkonduki Esperanton en la Liturgion per la aprobo de la Roma Meslibro (1990), dank’ al la nura persona interveno de Papo Johano Paŭlo la 2a, malgraŭ la obstinaj kuriaj brem-

santoj. Tial la IKUE-kongresantoj povis celebri ĝojoplene la Meson Elingve en la romaj Bazilikoj de Sankta Petro (1997) kaj de Sankta Paŭlo ekster la Muregoj (2000) en la “nova” lingvo: io kio similas al tio kio okazis kun la du Sanktaj slavaj fratoj. Ĝuste pro tio la IKUE-anoj havis kroman motivon por honori ilin en nia “internacia Katedralo” per la mozaikoj.

Cirilo ne reiris al Moravio. Li mortis en Romo la 14an de februaro 869 kaj estis entombigita kun papa honora kaj liturgia ceremonio, ĝuste en tiu preĝejo kiu poste nomiĝis Baziliko de Sankta Klemento, proksime de Amfiteatro Koloseo kaj de la Baziliko de Sanktaj Johano kaj Paŭlo ĉe Ĉeljo.

Metodo, konsekrita Episkopo de Sirmio kaj nomumita Nuncio de la Slavoj, reiris al Panonio kie li evangelizadis sen ŝpari klopodojn. Li tre suferis pro enmurmuroj. Li mortis la 6an de aprilo 885 en Velehrad, hodiaŭa Ĉeĥa Respubliko.

Johano Paŭlo la 2a per Apostola Letero “Egregiae virtutis” de la 31a de decembro 1980, okaze de la 1.100a datreveno de iliaj forpaso, nomumis la du slavajn Fratojn “Patronoj de Eŭropo” kune kun Sankta Benedikto. Do, ankaŭ pro tio ni honoras la du Sanktulojn en nia paroĥa preĝejo dediĉita al la Eŭropa Unuiĝo. Liturgie oni festas ilin la 14an de februaro.

Ĉar ĉiuj mozaikoj estis donacitaj duone de la paroĥa komunumo kaj duone de la katolikaj gesamideanoj, oni memorigis la fakton per du ŝildoj. En tiu dekstre, sub la figuro de Beata Patro Pio, estas bildigitaj grenspikoj kaj vinberaroj, simboloj de la Eŭkaristio, kun la esperantlingva skribaĵo: “LA KATOLIKAJ ESPERANTISTOJ 1998”. En tiu maldekstre, sub la figuroj de la paroĥaj Patronoj, estas bildigita olivarbo, simbolo de la Eklezio, kun la itallingva skribaĵo: “LA COMUNITÀ PARROCCHIALE 1998” (La paroĥa komunumo 1998). La inaŭguro de la tuta mozaiko de la Atestantoj okazis ĝuste la unuan de novembro 1998.

La tri Eŭropaj Patronoj fariĝas ponto inter la unua kristana erao de Sanktaj Johano kaj Paŭlo kaj tiu moderna de **Beata Patro Pio**.

Li estas bildigita kun la ritaj vestaĵoj kaj en la gesto beni la fidelularon je la fino de la Meso. Tio por memorigi la vortojn diritajn de la Beatulo al Pastro Magnani kiam ĉi-lasta anoncis al li la translokiĝon el la kamparo en la novan paroĥon de Sanktaj Johano kaj Paŭlo en Rimini: “Mi benas vin kaj la novajn paroĥanojn”.

Patro Pio, civilstate Francesco Forgione, naskiĝis en Pietrelcina (Benevento, Italio) la 25an de majo 1887. Enirinte en la kapucenan Ordenon (6.1.1903), li pastrigiĝis (10.8.1910) en la katedralo de Benevento.

La 28an de aŭgusto 1916 li atingas la monaĥejon de San Giovanni Rotondo, sur la Gargana promontoro en Apulio, kie, escepte de malmultaj kaj mallongaj forestoj, li restis ĝis sia morto, okazinta la 23an de septembro 1968.

Matene de vendredo la 20an de septembro 1918, dum li preĝis antaŭ la Krucifikso de la ĥorejo de la malnova preĝejo, Patro Pio ricevis la donacon de la stigmatoj, kiuj restis malfermitaj, freŝaj kaj sangantaj dum duona jarcento. Pastro Magnani ilin vidis per propraj okuloj kaj tion atestas.

Dum sia tuta vivo, Patro Pio zorgegis nur pri la plenumo de sia sacerdota ofico; li fondis la “Preĝ-grupojn” kaj modernan hospitalon, al kiu li donis la nomon “**Casa Sollievo della sofferenza**” (Domo por Mildigo de la suferado). La etapoj de la proceso de lia beat-



proklamo estas la jenaj:

20.03.1983, komenco de la dioceza proceso; 21.01.1990, fermo de tiu proceso; 18.12.1997, legado de la Dekreto pri la heroeco de la virtoj; 21.12.1998, publikigo de la Dekreto pri miraklo; dimanĉon, 2.5.1999, Johano Paŭlo la 2a proklamas Patron Pio Beata.

La liturgia festo okazas la 5an de majo, sed en nia paroĥo oni festas Lin ĉiam la unuan dimanĉon de majo komence de la somera feria sezono.

LA DU ORNAMAJ MOZAIKOJ



Tiuj ĉi ornamaĵoj bildigas la vortojn de Jesuo: “ **Mi estas la vinberarbo; vi estas la branĉoj; kiu restadas en mi kaj mi en li, tiu donas multe da frukto**” (Joh 15,5).

En la maldekstra panelo ĉe la niĉo de la Sankta Koro la du vit-branĉoj ŝarĝitaj je vinberaroj ŝajnas naskiĝi el kaliko, signita per la grekliteroj de la monogramo de Kristo. Ĝi estas

plenplena da Lia Sango, la vivodona limfo por ĉiu el ni. Je la flankoj de la kaliko bele montriĝas pavino kaj pavo kun la plumvosto ventumila kaj ĉielarka kologamo. Laŭ la kristana ikonografio ili simbolas la dian vivon en la Baptito kaj lian eternan vivon.

La vinberbranĉoj de ambaŭ paneloj, ekster la koncerna niĉo, ŝajnas brakumi, per siaj ekstremaĵoj, la emblemon de la Jubileo 2000, unu en la itala kaj la alia en esperanto. Tiuj vinberbranĉaj ekstremaĵoj, pli brilaj ol tiuj malsupraj, ŝajnas indiki la bezonon havi “jubilean aeron”, la dian reoksigenadon, t.e. purigado kaj mizerikordo.



La vinberbranĉoj, male, kiuj ornamas la niĉon de la Senmakula, naskiĝas ekstere de la fontovasketo, signita, ĉifoje per latinaj literoj, per monogramo de Maria.

Ili ŝajnas grimpi ĉirkaŭ la niĉo per la forto de intensa verda koloro en blua ĉielo, kvazaŭ refreŝigitaj kaj reviglitaj de la freŝaj akvoj de Maria, la “Gracoplena”,

samkiel la tri vivecaj kaj mildaj kolombetoj, simbolo de niaj animoj, kiuj sensoifiĝas kaj ripozas ĉe la bordo de la fontovasketo.



LA MOZAIKA TAPETO



Ĝi konsistas el rektangula mozaiko (3,40 oble 1,50 metrojn vasta) muntita en la granita planko tuj antaŭ la presbiteriejo, kie kutime la fidelularo ricevas la Komunion.

Granda bordo ĉirkaŭe per aparta ombroludado bildigas marondojn. Ĝi ŝajnas tapiŝo sur la marakvo. Ene de tiu ondobordo, du ŝnuregoj ĉiukaŭvolviĝintaj kiel harplektaĵo kadras du panelojn kun propra skribaĵo: en tiu maldekstre *“Prendete e mangiate”* kaj en tiu dekstre *“Prenu kaj manĝu”*.

La ŝnureg-plektaĵo aludas stilon de la romanika arto. Je la centro de la tapeto, kvazaŭ lulata per la konkavaj lateroj de la du paneloj, estas krono de grenspikoj kaj vivberaroj viciĝantaj kun grekaj literoj. Tiu ĉi konsistigas greklingve la vorton “fiŝo” (*iktios*), kiu por la unuaj kristanoj estis la simbolo de Kristo, ĉar la unuopaj grekaj literoj korespondis al la unuaj literoj de la vortoj **“Jesuo Kristo Filo de Dio Elacetanto”**.

La fiŝo, krome, portas korbeton kun panoj, simbolon de la Eŭkarestio.



MALGRANDA MUZEO PRI PATRO PIO

Elirante el la preĝejo, maldekstre sub la portiko-enirejo, staras malgranda muzeo pri Patro Pio. Temas pri relikvoj kaj memoraĵoj, ĉiuj kun dulingva klarigo, itale kaj esperante, koncernantaj la Beatulon kaj persone kolektitajn de Pastro Magnani, kiu multfoje renkontis la Patron en la jaroj 1959-1968. Li havis ankaŭ la esceptan eblecon kuncelebri kun la kapucenoj la funebran cerimonion, kio estis malpermesita por la diocezaĵaj pastroj pro la tro granda nombro da ĉeestantoj. Sekve, Pastro Magnani sukcesis ankaŭ procesie akompani la ĉerkon en la preĝejon de la Madono de la Gracoj kaj lastfoje rigardi la vizaĝon de Patro Pio, liajn ne plu stigmatizitajn manojn. Li povis de-

votece kisi lin tra la travidebla kovrilo. Estas oportune rimarki, ke Patro Pio estis la unua kaj la unika Sacerdoto kun la stigmatoj en la historio de la Eklezio.

La plej valoraj objektoj de la malgranda Muzeo, estas: sangokrustoj falintaj el la sangantaj manoj de Patro Pio; ŝtofo-pecoj trempitaj en lia brustvundo; lanskarpo; hararoj, tri aŭtografoj; aliaj objektoj (Kristo surkruce, rozarioj, medaletoj, statueto de Jesuo infano, kaj bildetoj) benataj kaj kisitaj de Patro Pio; meso-vestaĵoj kun kaliko uzitaj de li kaj kelkaj fotoj kun li.

Entute, la turistoj el foraj landoj, kiuj venos al la strando de Rimini, povos ankaŭ pritaksi nian paroĥon kiel malgranda internacia pilgrimloko honore al Beata Patro Pio. La “verda standardo” de Zamenhof kunligiĝas tre bone kun tiu de “internacia” Beatulo.

La standardo de la preĝ-grupo de nia Paroĥo



LA MONUMENTO HONORE AL PATRO PIO

Aldone al la mozaiko en la preĝejo kaj la malgranda muzeo honore al Beata Patro Pio el Pietrelcina, en la aero apud la preĝejo, oni starigis malgrandan monumenton kun bronza statuo - laŭ natura grando - de Patro Pio. Ĝi estas verko de Nicola Arrighini el Pietrasanta Lucca kaj la monumento estis inaŭgurita la 10an de Novembro 1996. En marmor-ronda bazo kun verda kvinpinta stelo centre elstaras kolono, kiu subtenas la statuon, kun la dulingva devizo “Sacerdote e Vittima / P. PIO / Sacerdoto kaj Viktimo”. Ĉio ĉi evidencigas la mondan elstarecon de la Beatulo, pri kiu atestis la eksterordinara amaso da fideluloj alvenintaj el la kvin kontinentoj okaze de lia liturgia Beatproklamo en placo Sankta Petro en Romo, la 2an de majo 1999.



PAROĤA PREĜEJO SANKTAJ JOHANO kaj PAŬLO

Viale Carlo Zavagli 73

I-47900 RIMINI RN (Italio)

Tel.-fakso: (+39) 05.41.26.447 - Retpoŝto: duiliomagnani@iol.it

(Itallingve) <http://www.diocesi.rimini.it/parrocchiehome/ssgiovanniepaoloit.htm>

(Esperantlingve) <http://www.diocesi.rimini.it/parrocchiehome/ssgiovanniepaolo.htm>

KIEL ATINGI LA PAROĤON

Nia Paroĥo staras ĉe la marbordo kaj ĉirkaŭe estas multnombraj hoteloj kaj gastejoj nemultekostaj. Ĝi estas facile atingebla per aŭtomobilo el la aŭtoŝosea elirejo "RIMINI NORD" kaj veturante laŭ la strat-indikoj al SAN GIULIANO MARE. El la fervoja stacidomo de Rimini oni povas atingi la paroĥon dum 5-minuta veturado per publika urba transportilo, aŭ piede dum 15 minutoj.

HORARO DE LA DISERVOJ

VINTRE: **labortage:** 7a kaj 17a; **antaŭ festotago:** 17a; **festotage:** 9a, 11a, 17a

La Diservoj de la horo 17a estas prokrastitaj je horo 18a kiam validas la leĝa horo.

SOMERE (de junio ĝis aŭgusto): **labortage:** 7a kaj 18a; **antaŭfestotago:** 18a; **festotage:** 7a, 9a, 11a, 18a

SANKTA ROZARIO - ĉiutage: unu horon antaŭ la posttagmeza Meso; **ĉiujaŭde:** 21a. Preĝgrupo de Beata Patro Pio; **ĉiun 13-an** tagon de la monatoj ekde Majo ĝis Oktobro (datrevenoj de la Aperoj en Fatimo. Sekvas Meso laŭintence de la ĉeestantoj).

SOLENA ADORAD-HORO: unu horon antaŭ la posttagmeza Meso en la jenaj tagoj:

Ĉiun unuan vendredon de la monato: (Asocio de la Preĝapostolado); **ĉiun unuan Sabaton de la monato** (Preĝ-grupo de Beata Patro Pio)

Aŭtoro de ĉi tiu gvidlibreto estas P. DUILIO MAGNANI.

Li naskiĝis en Misano Adriatico, 10 km sude de Rimini, la 11an de junio 1928. Li pastrigis la 28an de junio 1953. Post trijara helpopastrado, li iĝis paroĥestro en kampara vilaĝeto ĉe Rimini. Ekde 1964 ĝis hodiaŭ li estas estro de Paroĥo Sanktaj Johano kaj Paŭlo. Esperantisto ekde 1969, li estis Prezidanto de IKUE (Internacia Katolika Unuiĝo Esperantista) de 1979 ĝis 1999, en la jaroj de ĝiaj plej gravaj atingoj, kies motoro li estis

(en la bildo: lia mozaika portreto realigita de Antonino Vaccalluzzo)



IKUE - Internacia Katolika Unuiĝo Esperantista

Via di Porta Fabbrica 15, I-00165 ROMA RM (Italio)

Tel.-fakso: (+39) 06.39.63.81.29 - Retpoŝto: ikue@ikue.org

<http://www.ikue.org>

Organo: ESPERO KATOLIKA (petu senpagan specimenon)

La dioceza grupo en Rimini de la itala IKUE-sekcio kutime kunvenas lunde je la 21a. Somere bv. vin antaŭanonci.